

Heinrich Heine,
En dolĉega Maj’

tradukita de Friedrich Pillath

Printempe en dolĉega Maj’,
Dum la burĝonoj krevis,
El mia koro ĝerme
Amsento sin eklevis.

Printempe en dolĉega Maj’,
Dum birda kanto sonis,
De l’ kora mi sopiro
Konfeson al ŝi donis.

*Traduko de la Germana poemo “Im Mai” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de FRIEDRICH PILLATH (†1932-04.03).*

Arg-203-434 (2015-04-09 15:05:52)

*Tiu ĉi traduko aperis en Elektitaj Poe-
moj, Berlin: Esperanto-Verlag Friedrich
Ellersiek (2a eldono), 1920, p. 13. La
origina germana-lingva versio troviĝas en
la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika
intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. Pri
F. Pillath vidu ankaŭ la vikipedian rete-
jon [http://eo.wikipedia.org/wiki/
Friedrich_Pillath](http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath).*

Heinrich Heine,
En Majo

*tradukita de Manfredo Ratisla-
vo*

En Majo, kiam ĉiuj
Burĝonoj malfermiĝis,
La amo kiel floro
En mia kor’ estiĝis.

En Majo, kiam ĉiuj
Birdetoj sin aŭdigis,
Al ŝi deziron mian
Sopiran mi sciigis.

*Traduko de la Germana poemo
“Im Mai” de HEINRICH HEINE
(*1797-12-13 – †1856-02-17) en
Esperanton de MANFREDO RA-
TISLAVO (Manfred Retzlaff, Stetti-
ner Str. 16, D-59302 Oelde, Ger-
manio, *1938-11-04) en 1982-11-
14.*

*MR-002-4 / Arg-203-403 (2004-
04-05 20:37:00)*

*La poemo troviĝas en la „Libro de
la kantoj“, sekcio „Lirika interme-
zo“ (1822 - 1823), n-ro I.*

Heinrich Heine,
Im Mai

Im wunderschönen Monat Mai,
Als alle Knospen sprangen,
Da ist in meinem Herzen
Die Liebe aufgegangen.

Im wunderschönen Monat Mai,
Als alle Vöglein sangen,
Da hab’ ich ihr gestanden
Mein Sehnen und Verlangen.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEIN-
RICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17).*

Arg-203-402 (2004-03-24 07:28:07)

*Das Gedicht befindet sich in Heinrich Heines
Werk „Buch der Lieder“, im Abschnitt „Lyri-
sches Intermezzo“, Nr. I.*

Heinrich Heine,
En la mirida bela Maj’

tradukita de Kálmán Kalocsay

En la mirinda bela Maj’,
dum sin burĝonoj fendis,
en mia kor’ la amon
mi disvolviĝi sentis.

En la mirinda bela Maj’,
dum birda tril’ ne ĉesis,
al ŝi sopiron mian
konfide mi konfesis.

*Traduko de la Germana poemo “Im
Mai” de HEINRICH HEINE (*1797-12-
13 – †1856-02-17) en Esperanton de
KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Ka-
loĉajo, *1911 – †1976).*

Arg-203-1082 (2010-05-26 12:08:05)